

# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№12, Decembro, 2008

*Kara Leganto! Kara Leganto! Mi petas pardonon pro la abundo de la demandoj pri la sekvanta Zamenhofa tago. Nun mi pretas raporti sincere – ĝi sendube okazos, ni scias pri la loko, sed bonvolu estu paciencaj, eltenu tiun teruran tempon. La provizora adreso estas la jena: “Golden Thai Restaurant”, 1509 W Taylor Strato, Ŝikago, IL 60607. Nepre venu kaj prenu viajn amikojn – ili fariĝos niaj samideanoj! Mi devas konfesi, ke venontjare okazos la centjariĝo de la la unua libro, eldonita en nia kara urbo Ŝikago. Eble, ni eldonos, finfine, ion interesan, ligitan kun nia urbo. Due, mi promesas, ke nia bulteno aperos ĉiumonate, regule, dum la sekvanta 2009-a jaro. Trie, ĉi numero estas 49-a de la nova redakcio. Tio signifas, ke januare ni devas atendi la aperon de la 50-a numero (redakcio akceptos viajn salutojn. Anticipe dankon!) Malgraŭ ĉio – vivu la Esperanto en la plej granda urbo de la kontinenta Ameriko – en Ŝikago!!! Legantoj el la plej foraj niaj partner-urboj envas (blanke, ne nigre) nin kaj sincere deziras al ni prospeperon. Iam prezidinto de la UEA diris, ke la evoluo de E-o dependas de la Usono: kredu, ke ni estas unu el la plej potencaj E-kolektivoj en Usono! Dankon al d-ro R. Corsetti, ni paŝu antaŭen, “nur rekten... kaj ne flankiĝante...” Se iu havos la alian direkton – bonvolu nepre konfesi al nia estraro! Koran dankon. Dum la pasinta renkontiĝo prelegis s-ro Gregoro Dolgin. Li estas ege abunda poeto kaj verkisto. Do, bv. ĝui lian kreadon* Araneo

## PRINCINO CACA\*

Gregory S. Dolgin

Kia sezono pleje plaĉas al infanoj? Certe, somero! Tiam sur infana placet' regas gajo, precipe ĉe balanciloj. Jen konata por ni placet'. Balanciloj ĉi tie estis tri, sed infanoj ĉi foje venis plie. Maldekstre balanciĝis knabino, bel-vestita.

– Mi estas princin', – anoncis ŝi.

Etul' laŭ nomo Robik montris direkte al ŝi per fingro kaj prononcis: “Caca”!

Aliaj infanoj ekridis: “Princino Caca, princino Caca!”

Ankaŭ Robik volis ridi, tamen subite li ekploris. Ja li dume ne eklernis atendi.

Tial paĉjo de Robik diris: “Ĉiu devas balanciĝi ne pli longtempe, ol kiom da jara estas balanciĝanto. Kaj kial vi, knabino, balanciĝas jam 7 minutojn, se vi estas kvinjara?”

– Mi balanciĝas anstataŭ mia panjo, – respondis Caca. – Ŝi estas pli aĝa, ol mi.

Patrino de Caca jus renkontis apud la placet' sian amikino.

– Kia bona estas via filino! – admiris amikino de Caca panjo.

– Jes, mia filino estas bona, – konsentis panjo de Caca.

Ĉi-momente al la placet' alveturis bela trirada biciklo. Certe, ĝi ne mem alveturis. De l' biciklo elsaltis knabino

Nika kaj kuris al gajaj balanciloj. Samtempe Caca saltis for de l' balancilo kaj ekkuris direkte ties bela biciklo.

Nika apenaŭ sukcesis ekscii pri “balancilaj” minutoj, kiam subite ŝi rimarkis, ke la biciklo foriĝas. Oni scias, ke Nika kuras pli rapide, ol triradaj bicikloj, ja ŝi jam ne estas eta. Baldaŭ ankaŭ ŝi iĝos kvinjara.

– Ĝi estas mia! Redonu mian biciklon! – kriis Nika, atingante “la princinon” .

La ĉeestintoj mire observis: Caca volis forpuŝi la persekutulinon, tamen ĉe ili jam aperis avo de Nika. Kaj forpuŝi la avon Caca ne kuraĝis.

– Jen kio, – diris Caca al ties avo, – Nika bruas. Sed bruo ne plaĉas al mi. Venu ĉi tien morgaŭ kun la biciklo, tamen sen Nika. Mi rajdos morgaŭ.

– Kia bonkora, kia malavara estas filino via! – ravis amikino de l' princina panjo.

– Rigardu, ŝi donacas al Nika la biciklon!... Ankaŭ paĉjo de etul' Robik volis ion diri, tamen li enigme silentis.


Kaj vi, infanoj, kion opinias: ĉu Caca estas nur simple bona, aŭ tre bona?

*\*Moke dirante en la rusa pri ies ludilo, aŭ eĉ pri iu persono.*



## LASTE APERIS

Zamenhofa Tago ankaŭ estas la Tago de E-libro. Jen interesa informo por la leg-ŝatantoj: Ni jam informis vin, ke ĉi jare en Ukrainio aperis unuafoje E-traduko de la verkokolekto de la plej abunda ukraina poeto, verkisto, filozofo, tradukisto el 14 lingvoj d-ro Ivan Franko (vidu la apudan foton). Kompilis ĝin, verkis la antaŭparolon kaj tradukis prozan parton prezidanto de Ŝikaga E-Societo. V. Pajuk. Grandan parton de la poezia verkaro tradukis nia gasto el Rusio Mikaelo Bruna Ŝtono. Dezirantoj povas mendi la libron de UEA laŭ kodo ISBN 978-966-517-613-8. Agrablan legadon.



## EL NIA LETERKESTO

Multan dankon pro la bulteno. Tre bele farita kun interesa enhavo. Ĝi estas granda instigo kaj espero por nia lucerna grupo, kiu ege stagnas en la momento. Sincere, Esperanto-Societo Lucerno. *Sonja Brun*

## KORESPONDI DEZIRAS

Mi serĉas iun, kiu volus kunkorespondi rete. Mi estas 54-jara viro, loĝanta en urbeto en Ĉeĥa respubliko. Mia adreso estas la jena: nemecek @ seznam. cz



## Feliĉan Zamenhofan tagon!

Ni renkontiĝos en;  
**Golden Thai Restaurant**

**1509 W Taylor Rd**

**Chikago, IL 6060**

**(12:30 - 15:30 Posttagmeze)**

## Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktor' Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
[www.esperanto-chicago.org/](http://www.esperanto-chicago.org/)

## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;  
Familia membro : \$30, Regula: \$20  
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,  
Charles Gunn, 828 S. Ada St,  
Chicago IL 60607

## KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:**

Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.  
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

## Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

14an de Decembro – Zamenhofa Tago, BANKEDO  
(vidu la informon supre)

27an de Januaro – Henry Dunant, samtempulo de L. Zamenhof

